ISSN.0337.5838
n-ro 119
Aŭg-Sep.'77

# LA JUNA PENSO

ORGANO DE LA JUNULFAKO DE SAT

## POST—LA KONGRESO...




## ...DENOVE EK AL LABORO!

LA JUNA PENSO Dumonata Esperanto-gazeto
67 av. Gambetta, 75020 PARIS pĉk: La Source 34 26870 Z. Prezo 3FF.

A B O N T A B E L O

# PERANTOJ

| Lando | nura gazeta serio | gazeta + broŝura serioj | | |
|---|---|---|---|---|
| Argentinio | 2.20 | 4.40 | dol. | Enio H. Garrote, Juan Piñeyro Sud 560, Córdoba |
| Belgio | 160 | 320 | BF | Katja Lödör, Brusselsesteenweg 385, B-9219 Gentbrugge, pĉk 000-0591594-88 |
| Britio | 1,80 | 3,60 | p. | Christopher Long, 85 Point Royal, Rectory Lane, BRACKNELL, Berkshire |
| Danio | 25 | 50 | kr. | Uwe Lhose, Christianshavns Volgade 51,2 , 1424 København K, pĉk 5.14.41.16 |
| Finlando | 15 | 30 | mk. | Provizore, rekte la centron kontaktu |
| Francio | 18.50 | 37 | FF | rekte la centro: La Juna Penso, 67 av. Gambetta, 75020 Paris, pĉk La Source 34 268.70 Z |
| Germanio | 14 | 28 | mk. | A. Stephan, Carmenstrasse 5, D-4 Düsseldorf-Oberkassel, pĉk Essen 9168 |
| Hispanio | 130 | 260 | pes. | José Bernabeu, Gral. Primo Rivera 6, Callosa de Segura |
| Hungario | | | | Béla Kovács, H-8741-ZALAAPÁTI, DEÁK F.U. 68 |
| Izraelio | 9 | 18 | l. | Ch. Hocchauser-Armony, PO Box 5171, Haifa |
| Japanio | 1000 | 2000 | y. | Mine Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, Takasago hyogo-ken, pĉk Kobe 72148 |
| Jugoslavio | 16 | 32 | d. | Zijo Ajdinović, Jovana Cvijića 16/1, 71000 SARAJEVO |
| Kanado kaj Nordameriko | 5 | 10 | dol. | Séamas McClafferty, PO Box 246, Station F, TORONTO, Ontario, M4Y 2L5, Kanado |
| Nederlando | 12.50 | 25 | gld. | Bert de Wit, Leidsevaart 52, NL 2114 AD Vogelenzang pĉk 270 31 31 |
| Portugalio | 80 | 160 | esk. | Paulo Branco, rua Filarmónica 23, Vestiaria, Alcobaça |
| Svedio | 18.50 | 37 | kr. | Inga Johanson, Skeppargången 20 II, S-41318 Göteborg |
| Svisio | 13 | 26 | SF | M. Schneller, Eichholzstr. 20, 8500 Frauenfeld pĉk 85-11581 |
| Aliaj pagipovaj | 18.50 | 37 | FF | aŭ egalvaloro al unu el la ĉi supraj perantoj aŭ rekte al la centro en Parizo. |
| nepagipovaj | 10 | | IRK | aŭ kontaktu la centron. |

---

La peranto por Nederlando petas anstataŭigon. Kiu ŝatus transpreni ties taskon, tiu bonvolu kontakti lin aŭ skribu al LJP-prizorgantaro, 67 av. Gambetta, F 75020 Paris. La peranto por Svisio insiste petas anstataŭigon. Kiu povas helpi, tiu bonvolu kontakti ŝin aŭ skribi al la LJP-prizorgantaro. Ankaŭ la peranto por Kanado petas anstataŭigon. Krome, perantoj por Aŭstralio kaj Oceanio, Finlando, Irano, Italio, Pollando, Venezuelo kaj Sudameriko estas bezonaj.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

La verkantoj mem respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj.

Limdato por LJP 120: 10a de oktobro; por LJP 121: 28a de novembro. Bedaŭrinde, pro limigita amplekso de la gazeto, ligita al financaj konsideroj, ricevo de manuskripto antaŭ la limdato ne povas esti garantio de apero en la koncerna numero. Ni petas la indulgon de la verkantoj por la kaŭzita prokrasto. Prefere la manuskriptoj alvenu tajpitaj aŭ, minimume, legeble skribitaj. Ili ne estas resenditaj de la redakcio.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

A L I Ĝ U   A L   S.A.T. !

Detondu aŭ kopiu la ĉi suban mendilon kaj sendu ĝin zorge plenigitan al SAT, 67 av. Gambetta, F 75020 Paris.

---

Mi deziras ricevi aliĝdeklaron kaj ekstrakton el la Statuto de SAT
Nomo:
Antaŭnomo:
Naskiĝdato:
Kompleta adreso:

S.A.T. - J U N U L F A K O

37, rés. de la Madeleine, F 78460 Chevreuse

JF-Komitato: A.-S. Lévy, J.-P. Lévy, V. Ternant. Kasistino: M.-C. Lévy, pĉk La Source 35 420.09 A. Cirkulantaj Leteroj: Kris Long, 85 Point Royal, Rectory Lane, Bracknell, Berks., Britio. Filatelia Servo: Gerardo Malevanĉik, 39/41 rue St Fargeau, F 75020 Paris. Informilon vi povas peti ĉe la supre indikita adreso de la SAT-JF.

# GVIDREZOLUCIO

La 50-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta en Aŭgsburgo Germanio de la 30a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1977, kiu kunigis preskaŭ 300 laboristajn esperantistojn el 19 landoj post diskuto kaj aprobo de la raportoj

konstatas,

ke la tutplaneda homa vivo estas pli kaj pli malfaciligata pro monaj kaj aliaj gravaj problemoj, ĉiam ligitaj al la ekonomio de la nuna socio, kiuj perturbas la vivnivelon, foje endanĝerigas la pacon internacian kaj - en la kazo de atomenergio - vekas sekurecajn, financajn kaj moralajn problemojn tute ne solvitajn.

Kompreneble nia kongreso ne povas prezenti solvon, sed povas sugesti al ĉiuj membroj, ke ili klopodu disvastigi homecajn ideojn, kiuj kondukas al

a. mondvasta malarmado, kiu havus valoran spiritefikon, kaj donus financan eblecon por grandiozaj entreprenoj ekzemple: akvumado de dezertoj aŭ uzo de naturaj fortoj;

b. malapero de landlimoj. Ĉi tiuj disigas la popolojn favore al supernaciaj firmoj kaj bankoj;

c. lukto kontraŭ rasismoj kaj ŝovinismo ĉiuspecaj kaj ĉiukoloraj, kiuj danĝere baras mensevoluon de la popoloj;

ĉ. batalo por garantii la plenumon de Universala Deklaracio de la Homaj rajtoj, kaj la decidon de la Helsinki-konferenco.

apogas

la kampanjon por enkonduko de Esperanto en aertrafikon,kie la konfuzo pro pluraj lingvoj povas okazigi katastrofojn.

gratulas

la mondcivitanojn, kiuj en sia kongreso en Parizo en julio 1977 entuziasme akceptis Esperanton kiel mondlingvon de la Terfederacia konstitucio de la mondcivitanoj.

reasertas,

ke nia asocio estas laŭstatute peresperanta organizo, kies rolo estas antaŭ ĉio helpi al realigo de la klasaj celoj de la laboristaro kaj konstanta plialtiĝo de ĝia kulturnivelo. Por tion efektivigi la kongreso petas, ke la LEA komitato rekomendu al siaj membroj pli sisteman aplikon de la gotenburga konvencio kaj konforme al tiu ĉi pli intiman kunagadon - inter alie - en la kontaktoj kun la diversaj sindikatoj, partioj, aŭ asocioj progresemaj kaj en la propagando por Esperanto praktike utiligata por faciligi fratecajn rilatojn inter ĉiuj laboruloj de la mondo.

alvokas

la anojn de SAT kaj ĉiujn progresemajn esperantistojn, ke ili informiĝu pri la Junulfako pere de La Juna Penso, kaj ke ili subtenu la aktivecon de la JF ne nur morale aŭ finance, sed ankaŭ per varbado kaj materia helpo, tiel ke la JF povu pli sukcese realigi sian akceptitan agadplanon.

petas,

ke la membroj sentu sin respondecaj por la antaŭenigo de la ideoj kaj sugestoj esprimitaj en tiu ĉi rezolucio, kiu fariĝu nia gvidilo dum la tuta jaro.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

La 51a SAT-Kongreso okazos en Lectoure (Sudfrancio) dum la semajno 19780715 - '21.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Per la disvendo de LJP-materialo (LJP-nroj 115, 117 k 118, detranĉebla broŝuro el LJP 118) kaj abonoj dum la 50a SAT-Kongreso kolektiĝis 352,20 FF. Koran dankon al la junuloj kiuj helpis por tiu disvendo, kaj al la legantoj kiuj aĉetis la gazeton!

PROTOKOLO DE LA KUNSIDO DE SAT-JF
OKAZE DE LA 50-a KONGRESO EN AŬGSBURGO.

12 JF-anoj kaj proksimume 20 ne-JF-anoj kunsidis la 1-an de aŭgusto en salono Lanti de 15 h ĝis 17-30 h.

-) Jean-Pierre resumis la agadraporton de la JFK (aperinta en LJP n° 117 p. 4-5): Komence la aktivado de la JFK koncernis ĉefe la starigon de JF-sliparo, la serĉadon de perantoj kaj solidarecagojn. Post la rezigno de la ĝistiama LJP-prizorgantaro, la JFK devis organizi provizoran prizorgon de LJP , kaj poste samtempe roli kiel JFK kaj labori en la LJP-prizorgantaro; Dum tiu periodo JFK aperigis la informilojn pri CL kaj pri la Junulfako, kaj la Junularan Adresaron.

-) Marie-Christine prezentis la kasraporton de la JF (aperinta en LJP n° 117 p. 18)

-) Komentoj pri la supraj raportoj:
El proksimume 100 JF-anoj nur 30 abonas LJP-n;
Lus: Ĉu oni instigas al abono? - Jes, per LJP (vidu proponon poste);
Bert: Rememorigas ke ekzistas mono de la JF en Nederlando;

-) La kas- kaj agad-raportoj estas voĉdone akceptitaj (por: 12, kontraŭ: 0, sindet.: 0).

-) Anne-Sophie prezentis la Cirkulantajn Leterojn tiel: La respondeculo de la CL estas Kris Long. Bedaŭrinde li ne ĉeestas la kongreson, sed mi povas diri kelkajn vortojn pri tiu aktiveco. La Cirkulantaj Leteroj funkcias en la kadro de la Junulfako. La partopreno de la JF-anoj estas dezirata, sed ankaŭ tiu de ĉiuj junuloj estas akceptata kaj dezirata. La debatoj okazantaj per la CL-j aperas en LJP. (La venontaj CL antaŭviditaj temas pri: "Atomcentraloj", "Racio", "UFO-problemoj", "Ĉu ni ankoraŭ nasku?") Oni povas aliĝi al CL, kaj ne partopreni al debato kiu ne interesas; inverse se oni ne aliĝis, oni povas tamen okaze partopreni. La respondeculo de la CL estas: Kris Long / 85 Point Royal / Bracknell, Berks. / Britio.
Do turnu vin al li, kaj aliĝu amase!

-) Raportante pri la Junulara Angulo en S-ulo, Lus diris ke ŝi nur ricevis en la jaro 2 kasedojn por recenzo kaj neniun alian kontribuon.

-) Raporto de LJP-prizorgantaro (aperinta en LJP n° 117 p. 5). La prizorgantoj speciale menciis ke ili bezonas kunlaborantojn (ne nur el la Pariza regiono).
La agadraporto kune kun la kasraporto (LJP n° 117 p. 18) estis voĉdonitaj (por: 9, kontraŭ: 0, sindetenoj: 3).

-) Elekto de la Junul-Faka Komitato.
Rekandidatis Jean-Pierre Lévy, Anne-Sophie Lévy, Volito Ternant; ne estis aliaj kandidatoj. La kandidatoj estis kune akceptitaj per jena voĉdono: por: 12, kontraŭ: 0, sindetenoj: 0.

-) La JFK faris jenajn proponojn por la agado en la venonta jaro:
1) Serĉado de perantoj kaj fondo de lokaj grupoj.
La JF bezonas perantojn kiuj organizu la lokajn aktivecojn kaj informu la JFK-n.
Perantoj por LJP kaj JF ne estas la samaj.
2) Ĉiu JF-ano ricevu LJP-n sen kroma abono.
Ĉi tiu punkto okazigis longan diskuton. La JFK argumentis ke la JF eldonas la Gazeton kaj do rajtas je kompenso, krome tiu disdonado respondas al bezonata rimedo por la JF-laboro. La kaso de LJP estos mem-sufiĉa kaj sekve de la proponoj faritaj por LJP (vidu poste) tio okazigos neniun kroman elspezon.
3) La Gotenburga agadplano estu reenkondukata jene modifita:
-Estas ano de la JF ĉiu SAT-ano malpli ol 35 jara escepte de tiu, kiu klare esprimis sian volon ne esti JF-ano.
-Ĉiu nova juna SAT-ano estas aŭtomate konsiderata kiel JF-ano, ĝis kiam li/ŝi esprimas sian volon ne esti JF-ano; tiu ricevas informilojn pri la Cirkulantaj Leteroj kaj pri la Junulfako, kaj la Junularan Adresaron.
-La JF-anoj laŭeble verku artikolojn por LJP, partoprenu la Cirkulantajn Leterojn.
-La SAT-JF estu aktiva rilate (ne)esperantistajn (ne)junularajn asociojn aŭ organizaĵojn. Per solidarecdeklaroj (AI, CLAT, liberigaj movadoj, ktp), protestleteroj (kontraŭ ekz. subpremantaj aŭtoritatuloj) ĝi konigu sian pozicion. La JFK respondecas pri tiuj deklaroj, ilin ĝi publikigu (i.a. en LJP). Tiu aktiveco povas rezulti de

propono de iu ajn JF-ano.
-JFanoj starigu laborgrupojn, kies rezultatoj aperos en LJP aŭ pere de LJP-broŝurservo.
-) Tiuj proponoj estis unuanime akceptitaj.

-) La JFK rimarkigis ke ĝi bezonas scii la naskiĝjaron de la junuloj por povi ilin konsideri kiel Junulfakanojn. Tiun informon oni povas doni al SAT repagante sian kotizon.

-) Por plifortigi la kontaktojn de la JF-anoj, Grandière proponis ke la SAT-JF kunvenu dum la Pentekosta renkontiĝo de la Pariza Grupo en Nemurso.

-) Proponoj por LJP (akceptitaj kun unu sindeteno):
1) La abonperiodo komenciĝu nur post la registro de la koncernata abono kaj ne kiel nun ekde januaro eĉ kiam la abono okazas en decembro. Tiel ne necesos eldoni kromajn ekzemplerojn de LJP kio estos grava ŝparo.
2) La abontarifo estu plialtigita post interkonsento kun la perantoj.

-) Alvoko al niaj malpli junaj gekamaradoj (vidu la kongresan gvidrezolucion).

-) Estis unuanime akceptita propono por ke oni prezentu antaŭ la kongreso mallongan raporton pri la SAT-JF kunsido, kaj voĉdonigu la kongreson por ke ĝi donu (aŭ rifuzu) moralan apogon al la elektita linio de la Junulfako kaj ke ĝi instigu la membraron al porjunulfaka agado.

Dum la laborkunsido de la 2-a de aŭgusto la protokolinto prezentis la antaŭmenciitan raporton pri la SAT-JF kunsido. La dua parto de la propono konkretiĝis per speciala punkto en la kongresa gvidrezolucio alvokanta la anojn de SAT kaj ĉiujn progresemajn esperantistojn por ke ili subtenu la aktivecon de la Junulfako.

Protokolis Floreal.


= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

50a K O N G R E S O   D E   S.A.T   (daŭre)

En la fino de la tria laborkunsido la Kongreso de SAT akceptis unuanime la Gvidrezolucion (p. 3) kiel gvidilon por la estonta laboro. La kongresanoj trapasis en harmonia etoso belegan semajnon, kiu estis plenigita ne nur de kunsidoj, sed ankaŭ de interesaj prelegoj (5) kaj du ekskursoj, el kiuj la tuttaga kondukis al la Bavaraj Alpoj. La unua (al la lupolregiono) finiĝis en Pfaffenhofen, kie la loka grupo aranĝis festprogramon kaj salutparolis la bavara ministro por agrikulturo. Urbestro prof. Fischer parolis dum la Malfermo en la Urbdomo, kie li ankaŭ akceptis poste reprezentantojn de la movado. TESPA (la pariza Esp.teatro) prezentis kvinaktan dramon "La Justuloj" de A. Camus, kiu rikoltis merititan aplaŭdon. Sukcesas kongreso dank' al sperta organiza komitato.

(Laŭ komuniko de SAT)

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =




Respondojn kaj demandojn sendu al:

Redakcio de La Juna Penso,
67 avenue Gambetta,
F 75020 Paris.

1) Pri loka aktiveco   Ĉar mi loĝas en la pariza regiono, mi parolas pri tio, kion mi plej bone (sed tamen nur iomete!) konas: tie ekzistas SAT-rondo, LEA-grupo kaj nun la SAT-JF-anoj aparte ekorganiziĝas. Ŝajnas al mi ke ĉiuj tri grupoj ludas tre similan rolon. Ĉu ili ne riskas tiel dividi la fortojn de la loka anaro kaj do limigi la tutan aktivecon? Por tion eviti, kiuj, kiaj estas, aŭ devas esti, la rilatoj inter tiuj grupoj? Kiel dispartiĝas la taskoj inter ili?

Respondo. Tiu demando tuŝas fundamente la strukturon de nia Laborista Esperanto Movado. La respondo estas plej rekte kaj simple trovebla en la Gotenburga Konvencio, kaj precipe en ĝia paragrafo 9: "La SAT-rondo ne havu specialajn, lokajn kotizojn, sed

ĉiuj aferoj estu ordigataj en la kadro de la LEA-grupo. Estas dezirinde, ke ĉiu SAT-ano estu samtempe LEAano. La LEAoj devas nepre propagandi en ĉiuj eldonoj, por ke ankaŭ la LEAanoj fariĝu SATanoj. Same SAT devas propagandi, ke ĉiuj SATanoj fariĝu LEAanoj".

La LEAoj kaj SAT estas organize tute sendependaj asocioj. La LEAoj celas propagandi esperanton kaj varbi al SAT, kies celo estas utiligi esperanton por la klasaj celoj de la Laboristaro tutmonda. Tiuj taskoj estas tre malsamaj kaj postulas tute malsamajn rimedojn, kvankam ili estas samtempe nedisigeblaj . Tial la Gotenburga Konvencio difinas inter la respektive memstaraj asocioj la dividon de la laboro kaj la kunlaboradon. La fortoj de la loka anaro ne riskas dividiĝi, kiam ĉiuj membroj estas samtempe LEAanoj kaj SATanoj. La kontraŭa situacio (en kiu SAT kaj LEA havus respektivajn sed neniun komunan membrojn) estus absurda. La ĉefa partikularaĵo de la Junulfako estas, ke ĝi turnas sin al juna publiko. Cetere ĝi ne havas memstaran ekziston sed estas organo de SAT. La devo de juna LEAano, kiu varbas alian junulon al esperanto, estas ankaŭ varbi lin al SAT, tiel ligante la celon kun la rimedo; sed memkompreneble li ne kompetentus por tiu tasko, se li mem ne agus kiel SAT-ano, do Junulfakano. Aliflanke, juna SAT-ano, do Junulfakano, ne povas kontentiĝi je la peresperanta laboro en la nuna tro malvasta esperantistaro. Nepre necesas varbi. Tion li plej racie povas fari kiel LEAano per LEArimedoj en la kadro de sia Loka Grupo. Tiel, intime interplektiĝas ĉe la loka nivelo la por- kaj per-esperanta laboro.

En multaj okazoj la loknivela kunlaborado inter LEA kaj SAT (inkluzive Junulfakon) povas oportune funkcii en la sino de loka tiucela asocio, kiu faciligas la rilatojn kun interalie la urbestraro, kun aliaj lokaj asocioj kaj kun la loka loĝantaro. Tio permesas eventuale ricevi materian helpon (kunvenejon, afiŝejon, angulon en loka gazeto) kaj subvenciojn. La dispartiĝo de la taskoj en la loka anaro estas antaŭ ĉio afero de oportuno kaj disponeblaj fortoj. Pli gravas plenumi ĉiujn taskojn, ol eviti tute senriskan "konkurencon".

Petro Levi

2) Pri SAT-gazetarservo: Kio estas tiu servo, kiel ĝi funkcias?

3) Pri la punkto 1,ĉ de la Statuto: SAT celas i.a. "servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT" (Statuto, §1,ĉ). Ĉu nuntempe SAT ludas tiun rolon? Se jes, kiuj estas la asocioj, pri kiuj temas? Se ne, kiuj ili povus esti? Kia agado eblas tiurilate?

Respondo: Rilate tiun demandon, mi deziras tiri atenton sur mian nunan kampanjon por estigi kontaktopunktojn (Esperanto-parolantajn) en Eŭropo kaj fine ankaŭ en Japanio, Sud-Ameriko ktp por la MONDSOCIALISTA PARTIO./AA/

Tiuj socialistoj vere estas kvazaŭ ne-esperantistaj Sennaciistoj. Certe, ili estas tre minoritataj (samkiel ni Esperantistoj!) en la landoj kie ili ekzistas, sed ĝuste pro tio ili povus pleje profiti el la, almenaŭ parta, adopto de Esperanto kiel perilo.

Senteblaj mankoj ĉe la Monsocialistoj (el nia vidpunkto) estas (a) 90-procenta baziĝo en anglalingvio kaj (b) neekzisto de tutmonda movado paralela al SAT. En Francio, kie SAT estas plej forta, TUTE MANKAS fidindaj mondsocialistoj kaj vi povas imagi kiel grave estus por ili se ni povus eĉ nur dekon da membroj varbi por ilia movado. Se temus pri kvindeko, jam tiu kvanto sufiĉus por serioze instigi la Mondsocialisman movadon praktike utiligi Esperanton por atingi la ordinarajn popolojn en multe pli da landoj ol ili povas nuntempe (Aŭstralio, Aŭstrio, Britio, Irlando, Kanado, Novzelando, Svedio, Usono).

La plej granda el iliaj organizoj, kvankam modesta -ĉirkaŭ 600 membroj- estas la brita Socialista Partio de GB./BB/ Mia unua celo estas krei ponton inter la SPGB kaj sampensuloj en eŭropa franclingvio antaŭ ĉio, kredeble, en la vicoj de Sennaciistoj kaj Abundanoj kies principoj larĝe akordas kun la mondsocialismaj.

Se la unua etapo sukcesos, ni povos transiri al la nature sekvantaj pluaj celoj: -

(a) fondo de Mondsocialista Partio en Eŭropa Franclingvio
(b) fondo de Mondsocialista Frakcio de SAT
(c) firma propono por la kreo de Mondsocialista Partio Universala (=Internacio) en kiu Esperanto ludos elstaran, se ne ĉefan, rolon. /CC/
(d) sondado en Hispanio, Japanio, nederlandlingvio ktp por esplori eblecojn de kreo de pliaj filioj.

Fine, mi substreku, ke, se niaj planoj ne montros firmajn signojn de sukceso dum la venontaj 12 monatoj, mi intencas nek daŭrigi kvazaŭ dumvivan kampanjon por neatingebla celo nek eldoni bultenon por 10-15 legantoj! Multe pli bone en tiu okazo estus redediĉi nian energion en novaj direktoj.

Aliflanke, se ni en ia grado sukcesos ĉi tie, ni ne nur plenumos valoran rolon konforme al la Statuto de SAT, sed ankaŭ helpos du analogajn movadojn eliri el respek-



(daŭrigo p 9)

# PRI REGIONISMO

SAT-anoj ĝenerale anstataŭigas la realaĵon per revoj. Unu el tiuj realaĵoj estas la fakto, ke ekzistas diversaj etnoj kaj gentoj. Pri tio ne kulpas la interesitoj. Tio estas fakto, neneigebla. Pri tio respondecas neniu. Same kiel ekzistas nigruloj, blankuloj, flavuloj, ruĝuloj, brunuloj, ankaŭ ekzistas diversaj sango-grupoj A, B, AB, O kun resusfaktoro aŭ ne, ekzistas diversaj okul- kaj har-koloroj, diversaj trajtoj kaj homtipoj. Tio estas la realaĵo, tio estas faktoroj kun kiuj nepras kalkuli. Neniu estaĵo respondecas pri sia naskiĝo, raso, sekso. Tio estas naturaj biologiaj donitaĵoj.

Nu, aro aŭ parto de tiuj biologiaj karakterizoj povas determini etnon. Ni imagu etnon kun jenaj karakterizoj : blanka haŭto, meza staturo, nigraj haroj, brunaj okuloj, sangogrupo O, Rh - . Homo kiu posedas ĉiujn ĉi karakterizoj povas esti konsiderata kiel centprocenta etnano. Kompreneble, tio estas ideala difino, plejofte mankas tiu aŭ alia karakterizo al sametnano. Bone komprenu, tio ne estas rasismo, tio estas FAKTO. Manko de unu el la ĉefaj karakterizoj, plejofte haŭt-koloro estas sufiĉa kriterio por decidi, kiu ne estas sametnano.

Surbaze de rasaj konsideroj kreiĝas gentoj, kiuj alproprigas al si komunan kulturon, parolas propran lingvon, laŭlonge de komuna historio. Formiĝas kolektivo, rekonebla ne nur per eksteraj fizikaj signoj, sed ankaŭ en la socia vivo. Tio estas artaj sociaj akiraĵoj. Tamen, bebo kiu naskiĝas en tiu gento ne respondecas pri la de siaj gepatroj lingvo, religio aŭ politikaj opinioj, kiujn li aŭ ŝi ankaŭ alproprigos al si laŭvice.

Same kiel rasaj kriterioj estis determinaj, ankaŭ sociaj kriterioj sufiĉas por determini genton. Plej grava kriterio sendube estas lingvo, aŭdebla signo el kiu rekoneblas sam- aŭ malsamgentano. Lingvo estas fizika socia akiraĵo, perceptebla per senso. Nu, tio estas la realaĵo, kun kiu nepras kalkuli. Vole, nevole ekzistas diversaj lingvoj, kredoj, soci-sistemoj, kiuj apogas rasajn diferencigajn kriteriojn.

Ĉefa problemo por homo estas ties aparteno, identeco al iu kolektivo. Homo kiel socia besto bezonas identiĝi kun io. Bona pruvo pri tio estas la ĝenerala sinteno al mestizoj, tio estas rasaj aŭ 'kulturaj mestizoj'. Ekzemple, homoj kun unu eŭropa kaj alia azia gepatroj, plej-ofte sentas krizon de identeco. Plejofte, ili estas same forĵetataj de la azia same kiel de la eŭropa komunumoj, parte pro rasaj, parte pro kulturaj konsideroj. Nu, tio estas ĝenerala socia sinteno. Nei la problemojn, tio ne estas solvi ilin. Ŝajnigi kvazaŭ ne estus diferencoj, ŝajnigi kvazaŭ ĉiuj estus samaj, tio estas negativa sinteno.

Koncerne regionismon, kiu estas plej reakcia ? Ĉu tiu kiu apartenas al iu etno, aŭ ĉu tiu, kiu batalas kontraŭ apartismo ? Ĉu tiu, kiu parolas la bretonan lingvon kaj defendas ĝin, aŭ ĉu tiu, kiu pledas por la franca ? Kiu estas naciisto, ĉu tiu, kiu luktas por defendi regionismon, aŭ ĉu tiu, kiu pledas por ŝtatismo ? Ĉu la agresato estas reakcia aŭ la agresanto ? Nu, post legado de viaj cirkulantaj leteroj, mi havas la impreson kvazaŭ SAT-anoj intence konfuzas la rolojn. En tio ili sekvas la tezojn de la PSOE kaj PCE, kiuj pretendas mortigi la vaskan lingvon sub preteksto de internacia klasbatalo. Sed bone atentu : kiu ne defendas unue minacatajn naciojn, tiu entute rezignas pri estonta internacia klasbatalo. Oni ne povas defendi la aliajn, se oni unue ne defendas sin mem. Ĉar je kies nomo ni pretendos trudi internacian lingvon, se ni ne sukcesis batali kontraŭ truditaj de la ŝtato kulturo kaj lingvo ? Mi tre dubas, ke ekzemple vaskoj iam simpatios al esperanto, se ni antaŭe ne defendos la vaskan lingvon kontraŭ la hispana-franca kulturaj imperiismoj.

Bedaŭri la ekziston de regionaj apartismoj, tio estas malracia sinteno, malfavori ilin, tio estas taktika eraro. Kiu malagnoskas la ekziston de vaska apartismo, kaj samtempe strebas al sennaciismo, tiu malsimpatiigas vian movadon al koncerna etna malplimulto. Nur surbaze de justa aprezo de kulturoj povos iam formiĝi tutmonda socio. Plu nei ekziston de kulturaj minoritatoj nur povas plifirmigi ties deziron al apartiĝo. Mi tre deziras ke iam SAT-anoj revekiĝu al realaĵoj, provu lerni kaj favori minacatajn lingvojn kiam ankoraŭ ne estas tro malfrue. Ne dependas de SAT-anoj, ke ekzistas aŭ ne problemoj : ekzistantaj faktoj estas ne-ŝanĝeblaj, sinteno al ili ja estas. Estontaj faktoj dependos de tiu nuna sinteno.

Dominique CORNICE

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

TUJ NOTU : Dimanĉon la 23an de Oktobro, jara festo de TESPA (Teatro ESperanto de PArizo). Prezentado de: "L A J U S T U L O J" de A. Camus (tradukis G. Lagrange) je la 15a en M.J.C. 14 rue Censier 75005 Paris. Metroo Censier. Provincanoj aŭ eksterlandanoj kiuj volus tranokti en Parizo estas petataj sin anonci. TESPA sekretario: F-ino S. Gaspard, 10 rue Georges Dupont, F 95870 BEZONS.

I - Respondo al la artikolo

" Ĉu iam en Bretonio ĉiuj parolos bretone"

K-do MARTIN en sia artikolo, skribis :

"Bretona lingvo ne estu konsiderata kiel oficiala lingvo; la agado de la bretonlingvaj partizanoj estas la malo de la nia ".
Ĉi-sube, mi provos klarigi alian vidpunkton kaj respondi al liaj demandoj.

II - Ĉu ekzistas oficiala bretonlingvo ?

Fakte, en Bretonio ekzistas pluraj bretonaj lingvoj, kiuj pli, malpli similas unu la alian. Tiel, unuigprovo ekaperis : lingvo K.L.T. kiu kunigas lingvojn el (Kornouaille; Léon; Tregor). Laŭdire, tiu lingvo konvenas al bretonparolantoj de tiuj regionoj; sed bedaŭrinde, tiu lingvo komuna ne konvenas al sudbretoniaj Bretonoj kiuj uzas lingvon sufiĉe malsimilan al la aliaj ("Vannetais").

Tamen, tiu nuna projekto estas tute valora, ĉar, la ekgelernantoj povus unuŝtupe lerni tiun lingvon kaj do, skribi kaj legi ĝin; poste aŭ paralele lerni, paroli siajn regionetajn lingvojn en najbarara medio.

III - Kial lerni la bretonan lingvon ?

Jen, klarigoj pri celo de la bretonlingvaj partizanoj :
Ili ne trudas ke neniamaj bretonparolantoj tuj lernu (ne timu!); kaj oni nepre batalu kontraŭ modon paroli lingvon, al kiu, oni neniel estas ligata. Lerni bretonan lingvon devige estu respondo al interna bezono, ĉar fakte, multaj Bretonoj suferas pro manko de io. Ĝis nun, la preskaŭtutaj Bretonoj kaŝis siajn internajn sentojn, truditaj forpeli siajn proprajn originojn. Ĉi-sube, interalie, estas kelkaj argumentoj por lerni la lingvon:

a) - KLARIGI LA VILAĜNOMOJN:
( ne hazarde, la Esperanta asocio Renna nomiĝas K.E.R. kiu estas bretonradiko signifante "vilaĝo").

b) - VERE INTERDIALOGI kun la maljuna kaj mezaĝa generacio, ĉar, kion ili akiris dum sia vivo, ili ne povas transdoni al siaj gefiloj. Lingvo estas veturilo de kulturo kaj tiuj, kiuj rekte pensas en bretona malsukcesas traduki en francan, nuancajn ideojn.
Tiu lingvo veturigas kamparan kulturon kaj ni nepre provu finsavi la ankoraŭajn restaĵerojn.

c)- Tiel, se sufiĉnombraj BRETONOJ lernos sian lingvon, ni eble povos retrovi kaj nian totalan vivprocezon kaj nian propran kulturon kiuj estas faktoroj de ekvilibro socia, persona.

IV - Rilatoj kun ŝtato

- HISTORIA PUNKTO :

Bretonoj estis malpermesitaj uzi sian lingvon en lernejo kaj estis devigataj paroli la nacian. Tio estigis ĉe Bretonoj realan psiktraŭmon; de post psikanalizo oni scias kiel grava estas la mensnuanca esprimo. Tio klarigas kial multaj el ili, rifuzas instrui la lingvon al siaj gefiloj, kaj paroli ĝin en familio. Tiam, lingv-mort-procezo ekkomenciĝadis.

- MENDOJ :

Celo nia tekstas jene: Bretona lingvo estu konsiderata kiel oficiala lingvo kaj povu esti instruita en ĉiuj lernejoj. Tie kuŝas la plej bona maniero revivigi nian kulturon. Certe, oni ne trudu al la ne interesatoj lerni ĝin. Sed, ĝi devas esti akirebla por ĉiuj, kiuj deziras kaj lerni kaj perfektiĝi. Aliparte oni ne konfuzu aŭtonomecon, tio estas, regiono kiu sin regas per siaj propraj leĝoj, kaj regiono disvolvigante sian propran kulturon libervole en nacio.

V - Ĉu paroli la bretonan signifas esti naciisto ?

Mi tute ne kredas al artefarita unuigeco de la homaro. Diferencoj signifas riĉecon, kondiĉe ke la malsameco estu komprenata kaj klarigita; profiton kaj riĉecon ni eltiras el interkomunikiĝo se la debatpartoprenantoj havas malsamajn spertojn. Do, retrovi niajn radikojn, dum samtempe, ni ĝuas la inter kompreniĝon kun aliregionuloj; ŝajnas al mi, ke tio tute malsimilas al naciismo.

VI - Rilatoj inter bretonaj movadoj kaj esperantaj

Tie, laŭ mi, kuŝas la plej interesaj agoj estonte. Ĉu la esperantista celo ne estas antaŭigi liberon ? Ni jam kontaktas kelkajn Bretonojn kiuj alvenas al Esperanto; kaj ĉiuj kune firme deziras agi komune por esperanta-bretona disvolvigo . Por tio, mi sugestas krei en Bretonio asocion kunigante kaj bretondisvolvigantojn kaj esperantistojn. Tio permesus kontakti aliulojn, ĉar ofte, oni nur agas siaflanke.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

J U N U L A R A  A D R E S A R O :

Guy VANDERPUTTEN estas SAT-ano 32 344. La legantoj bonvolu korekti la eraron, kiu enŝoviĝis en la JA-n (LJP 116).

Ĉiam kaj ĉie vera anarkiisto defendas individuon aŭ malplimulton kontraŭ la reganta klaso aŭ kasto, partio, klano, kliko, kontraŭ la ŝtato kaj ĝiaj servistoj : polico, armeo, juĝistaro; kontraŭ la oficiala aŭ neoficiala propagando de la registaro aŭ de regtendenca partio; kaj same kontraŭ la kruela fortego de blinda popolamaso.

-:-:-:-:-:-:-:-

Nun mi antaŭvidas alian rebaton.

- Bone, diros iu. Belega teorio- sed kiu ĝin aplikas ĉiam kaj ĉie? Vi bombaste definis "veran anarkiiston". Cu vi rajtas vin mem flati per tiu nomo?

- Certe ne, ho ve! Kaj tial mi ne aŭdacas diri min anarkiisto. Kaj eĉ, eble mi devus diri : kie estas vera anarkiisto ? Kiu, laŭ tiu difino, meritas tiun nomon?

Lanti mem konsciis kaj konfesis,ke strebante al sennaciismo, neniu el ni estas tute liberigita el la nacia infekto : ankoraŭ longe ne ekzistos vera sennaciulo. Same, kiu estas tute liberigita el pratempa inklino al obeemo, al servutemo, kaj samtempe el daŭra, insida deziro al ordonemo kaj perfortemo? Liberecanoj ni estas, sopirantaj al plena libereco, kaj strebantaj almenaŭ al mensa libereco- sed kiu fakte ĝin atingis?

Kredeble neniu. Samkiel ne ekzistas veraj sanktuloj, puraj bonuloj. En nia mondo ne ekzistas perfekteco. Perfekta estas nur Dio.

-:-:-:-:-:-:-:-

- Dio? ĉu do vi estas dikredanto?

- Ne .... aŭ pliĝuste : jes !

Ja certe, Dio ekzistas... en la imago de homoj - Kiam neniu aplikos perforton al alia; kiam neniu estas subpremata kaj neniu subpremanta; kiam ĉiu estos libera kaj respektos alies liberon; tiam venos tio, kion iuj nomas "la regno de Dio"

Sed tiu "Dio" ne estas la Dio de la kristanoj nek de iu alia religio- ĝi ne estas supermastro, kiu bezonas ordoni kaj devigi, rekompenci kaj puni. Ĝi estas nenio ekzistanta : nur nomo por signifi la naturan perfektan staton, en kiu ĉiu homo libere disvolvus sian individuecon, neniam atencante al la libera disvolviĝo de iu alia homo. Ĉu fine la "regno de tiu Dio" estas io alia ol tio, kion ni nomas anarkio?

" Kiam estos ni en temp'anarkia..." kantis Sebastien FAURE laŭ la ario de la fama Tempo de l'ĉerizoj. Ĉu iam venos tiu tempo?

Same kiel "Dio" aŭ perfelteco, plena anarkio kredeble neniam ekzistos.

Sed ĝi povas esti, neatingebla, la idealo al kiu ni sopiru per nia tuta deziro, al kiu ni strebadu per nia tuta volo, por kiu ni laboru kaj batalu per nia tuta forto

Kiel malproksime mi staras de tiu idealo, mi, kiu akceptis fari milit-servon, eĉ konsentis fariĝi oficiro (almenaŭ dum kelkaj jaroj); mi, kiu regule pagadas imposton al la ŝtato, kaj kondutadas ĝenerale kiel "bona civitano"!

-:-:-:-:-:-:-:-

Tra densa mallumo briletas la celo
al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo
al ni la direkton ĝi diras.

Ju pli ni antaŭeniros en tiu direkto, ĉiam rigardante al la malproksima sed briletanta celo, des pli ni liberiĝos; des pli ni meritos la nomon liberecano; des pli ni fariĝos veraj homoj.

-:-:-:-:-:-:-:-

Sébastien FAURE mortis ne vidinte la alvenon de la Tempo de Anarkio. Ankaŭ mi ne ĝisvivos ĝin. Nek ankaŭ vi, junaj kamaradoj-kaj neniu el viaj posteuloj.

Ĉiam kaj ĉie plu ekzistos subprematoj, kiuj bezonos nian helpon. Ĉiam kaj ĉie necesos luktadi kontraŭ ekspluatadon, subpremadon, perforton, superpotencon.

Ĉiam kaj ĉie, kontraŭ la individua libereco staros diktatoroj am ŝtatoj, reganta klaso aŭ partio, premanta plimulto, konformisma amaso, leĝo, tradicio,moralo...

Ĉiam kaj ĉie necesos batalado.Ĝi estas nia tasko kaj nia honoro.

VALO

# ☮ Por la paco ☮

Agadraporto :

Membraro: La Pacista Frakcio konsistas el 20 membroj: 19 kiuj pagis aŭ repagis sian kotizon en Gotenburgo + 1 novaliĝinto. La aliaj, kiuj ne ĉeestis la kongreson, forgesis repagi sian kotizon.

Rubriko "Por la paco" en L.J.P.:
La sekretariino, akceptinte sian taskon en Gotenburgo, pensis ke ŝi devas ricevi kontribuaĵojn de la diversaj membroj kaj ordigi ilin por fari rubrikon. Sed ŝi ricevis NENIUN kontribuaĵon de la aliaj gefrakcianoj.Tial ŝi plenigis mem la rubrikon per informoj, kiujn ŝi opiniis konindaj en la diversaj landoj de Esperantio, prezentante la diversajn internaciajn pacorganizojn kaj tekston pri la rilatoj inter neperforto kaj memmastrumado. Ŝi neniam ricevis rimarkojn de la frakcianoj pri la enhavo de la rubriko.

Subteno al enkarcerigitaj armerifuzantoj:
Ĉar ŝi promesis en Gotenburgo daŭrigi la poŝtkartan agadon, k.dino Lépeix skribis plurfoje al la Internacio de Militrifuzantoj en Bruselo por peti listojn de enkarcerigitaj armerifuzantoj.Sed ŝi neniam ricevis respondon. Tial ŝi publikigis en Sennaciulo kaj LJP la adresojn de malliberaj kamaradoj, pri kiuj informis ŝin la neperfortaj gazetoj, kiujn ŝi abonas, aŭ la grupoj, ĉe kiuj ŝi aktivadas. Ĉar ŝi vivas en Alzaco, k.dino Lépeix estas ĉefe informata pri la okcidenteŭropaj armerifuzantoj. Tiu unuflankeco estas tre bedaŭrinda, tial estas dezirinde, ke la kamaradoj el diversaj landoj konigu al la frakcio la malliberulojn el siaj mondregionoj.

Propagando, rilatoj kun aliaj pacmovadoj:
Ĉar la broŝuro:"Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo?" ne vendiĝis, la sekr.ino decidis sendi propagandcele ekzemplerojn al la internaciaj pacmovadoj, menciitaj en la adresaro"Peace Diary 1976" por iom konigi Esperanton kaj SAT. La nura reago al tiu iniciato estis la vizito de la sekr.io de la Internacia Civila Servo.
La sekr.ino rilatis nome de la frakcio kun la Popola Movado de la Mondcivitanoj.
Konsiderante ke la celoj de la dua internacia neperforta marŝado por la malmilitistigado akordiĝas kun niaj, k.dino Lépeix skribis nome de la frakcio al la germana kunordiga komitato por esprimi la subtenon de la frakcio al la marŝado.

Persona konkludo de k.dino Lépeix:

Dum unu jaro unu persono havis la absolutan povon fari nome de la frakcio kion ajn ŝi volas sen iu ajn kontrolo far la membraro. Ŝi elspezis la monon de la frakcio por celoj, kiujn ŝi mem opiniis bonaj, ŝi plenigis la frakcian rubrikon per informoj, kiujn ŝi mem opiniis konindaj, ŝi uzis tiun rubrikon por esprimi politikajn opiniojn proksimajn al siaj, ŝi donis subtenon al agado, kiun ŝi mem opiniis subteninda.
Ĉi tio okazis sen ke iam ajn ŝi konis la opinion de la aliaj membroj pri siaj iniciatoj, sen ke iu ajn aŭdacis fari la plej etan rimarkon.
Tia monarkia funkciado de la frakcio estas netolerebla por kiu serioza konsideras la celon, kiun SAT iom donis al si:memmastrumado.La principon, sur kiu baziĝas neperforto, difinis Gandhi tiel: "La celo estas en la rimedoj, kiel la arbo estas en la semo". Se nia celo estas memmastrumado, do, ni devas komenci en nia frakcio.Ĉiu membro do devas konscii pri sia respondeco, mem aktivi anstataŭ delegi sian povon al persono, kiu ĝis la venonta elekto, havos la tutan povon en lia aŭ ŝia nomo fari kion ajn ŝi deziras. Tial mi ne ŝatus denove kandidati por sekr.ino.

Jacqueline

RAPORTO PRI LA DUA INTERNACIA MARŜADO NEPERFORTA POR MALMILITISTIGADO.

Ĉi tiu marŝado havis kiel celon informi pri atomarmiloj, militista justico kaj atomcentraloj. Proksimume 300 marŝantoj iris de Hagenau al Lauterburgo (franca Alzaco), pasante per Landau(FRG).Jen resumo de la ĉefaj agadoj de tiu marŝado :

la 14-an de julio: Hagenau - Oberhoffen - Hagenau.

Matene la marŝado fariĝis manifestacio en Hagenau. Kiam oni estis renkontonta la patriotan defiladon de la militistoj kaj fajristoj, solenantaj la francan nacian feston, vico da policistoj malhelpis la antaŭeniradon de nia marŝado. Ni sidiĝis kaj post la pasado de la patriota defilado, la neperfortaj marŝantoj rajtis pluiri.
Posttagmeze ni volis iri al la militista tereno de Oberhoffen, kie la franca registaro volas meti 6 plutonarmilojn (etaj bomboj, kiuj estas "nur" tiel fortaj kiel tiu de Hiroshima), sed la policistoj baris al ni la vojon.

la 15-an de julio: Hagenau-Soulz-sous forêt.

Tiu etapo estis tute dediĉita al la informado de la alzaca popolo pri militistigado kaj atomcentraloj. La komunumo de Soulz estas progresema kaj ĝi jam konigis sian maltrankvilecon pri atomcentraloj. Ĝi ne estas kontraŭmilitista, sed opinias, ke la popolo devas pripensadi la aferon kaj ke debato pri la armeo estas interesa. Tial, male al la aliaj komunumoj trairitaj de la marŝo, Soulz akceptis la inviton de la marŝantoj kaj venis por dialogi.

la 16-an de julio: Soulz-Wissenburg (fulghaveno)

Ni iris surprize al la militista flughaveno de Drachenbronn kaj sukcesis eniri la kazernon. La estra oficiro ordonis ĵeti akvon al ni, sed la soldatoj zorgis ke la ĵeto ne estu tro brutala.

la 17-an de julio: Wissenburg -Klingenmünster: transiro de la ŝtatlimo.

La ĝenerala asembleo decidis ke la marŝantoj transiros la ŝtatlimon sen montrado de legitimaĵoj. La francoj lasis nin pasi, sed la germanoj ne. Ni sidiĝis inter ambaŭ ŝtatlimoj kaj tie diskutadis dum pluraj horoj, pri kio estas farenda. Dum tiu longa debatado, ambaŭ ŝtatoficistoj venigis policistojn, por malhelpi al ni reiri Francion aŭ iri Germanion. Fine, trudataj de la polica perforto, ni montris la legitimaĵojn kaj iris al Germanio. La armerifuzantoj kaj dizertintoj en mallegaa situacio sukcesis transiri per pruntitaj paperoj.

la 18-an de julio: Klingenmünster -Landau.

En Landau troviĝas tribunalo kaj malliberejo de la franca armeo. Ni antaŭeniris en longa vico, kun la manoj sur niaj kapoj, similante vicon da malliberuloj. Tiel ni rondiris plurfoje la malliberejon kaj poste iris tra la tuta urbo.
Vespere, ĉe la publika kunveno, ni legis komunikon de la francaj soldatkomitatoj de Palatinato kaj alian komunikon pri la sorto de la dizertinto Emmanuel Belkessa, kiun oni trovis mortinta en sia ĉelo de la militista malliberejo de Landau.

la 19-an de julio: Landau -Neupotz.

Dum tiu etapo ni informis la palatinatan popolon pri la danĝeroj de la konstruado de atomcentraloj en Neupotz (Germanio) kaj en Lauterburgo (Francio) Vespere ni montris filmon pri la venka lukto de la vinistoj kontraŭ la centralo en Whyl projektita.


la 20-an de julio: Neupotz - Berg :

Ni decidis tranokti en Germanio por havi la tempon prepari la transiron de la ŝtatlimo.

la 21-an de julio: Berg-Lauterburgo: transiro de la ŝtatlimo.

Dum la nokto, grupo da kvardek personoj kun veturiloj transiris la ŝtatlimon kaŝe per negardataj stratetoj, tiel ke matene la doganistoj retrovis sin inter du grupoj da manifestaciantoj, sur ambaŭ flankoj de la ŝtatlimo. La marŝantoj restantaj en Berg dividis sin en du grupojn: tiuj, kiuj volas transiri per legitimaĵoj kaj tiuj, kiuj ne volas montri ilin. Ĉiu sin maskovestis al io, kio pasas aŭ ne pasas tra la ŝtatlimo. Ekz.e, radioaktiva persono pasas (ĉar li havas paperojn), senpatria anarkistino ne pasas sen paperoj. Komence la etoso estis bonhumora kaj ni organizis "ludon sen ŝtatlimo", ĵetante balonon trans la ŝtatlimon, ridigante la doganistojn kaj ŝtatlimpolicistojn.
Sed poste la afero fariĝis malpli humura, ĉar venis grupo sen legitimaĵ-

-oj kaj la doganistoj rifuzis ilian transiron. Post atendado, la grupo ŝajnigis bruligi la legitimaĵojn. La ŝtatlimpolicistoj intervenis kun klaboj kaj hundoj. Oni ankoraŭ atendis kaj ĉar la germanaj aŭtoritatoj ne sciis kion fari kun tiu internacia grupo sen legitimaĵoj, ili fine decidis forpeli ilin al Francio , almenaŭ ĉiujn ne-germanojn. Sed la ŝtataneco de homo ne estas skribita sur la vizaĝo, kaj fine ĉiuj marŝantoj, germanaj aŭ ne, sukcesis iri al Francio.
Siaflanke la francoj akceptis ĉiujn sen kontrolo, probable ĝojante ke la problemon devis solvi la germanoj.
P.S. dum la manifestacio mi faris Esperanto-propagandon-Ĵaklino.




PROTOKOLO pri la KUNVENO de la PACISTA FRAKCIO, okazinta la 5-an de aŭgusto 1977 en Augsburg, dum la 50-a SAT-kongreso.

Ĉeestis la kunvenon dudeko da gekamaradoj. La sekr.ino, k.dino Lépeix ne povis ĉeesti kaj ŝin anstataŭis k.do B. de Wit kiel prezidanto de la kunveno.

Unue la raporto de la sekr.ino pri la pasinta agadjaro estis laŭtlegata kaj la financa raporto prezentata sur nigra tabulo. :

FINANCA RAPORTO PF

| Enspezoj | | | Elspezoj | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ricevitaj de kdo Schneller | 400 | FF | pago de broŝuroj | 334 | FF |
| kotizoj | 195 | ,, | Propagando | 100 | ,, |
| vendo broŝuroj | 15 | ,, | Rubriko "por la paco" | 8,80 | ,, |
| donaco | 10 | ,, | saldo | 177,20 | ,, |
| | 620 | FF | | 620 | FF |

Enspezoj ĉefe venis de la kotizoj, ĉar la broŝuroj ne vendiĝas. La sekr.ino pagis al Kribo la tuton de la broŝuroj ŝulditaj al li. 60 broŝuroj estis sendataj propagandcele.
Post legado de la persona konkludo de k.dino Lépeix ,en kiu ŝi esprimis la deziron retiri sin el sia posteno, oni diskutis la eblojn ŝin anstataŭi per alia persono. ĉar oni ne trovis iun preta, oni decidis proponi al k.dino Lépeix, provizore daŭrigi sian laboron, ĉar ĉiuj estis kontentaj pri la laboro farita. Intertempe oni serĉos alia(j)n kandidato(j)n, kiu(j) pretos okupiĝi, (eble kune kun k.dino Lépeix) pri la aferoj de la Pacista Frakcio. Kun kontento oni aŭdis la raporton pri la dua neperforta marŝado .
Temo de la sekvanta debato estis :"Pacpolitiko kaj homaj rajtoj". Enkonduke, k.do de Wit konstatis ke al "homaj rajtoj" fariĝis ĉiutaga aktualaĵo, almenaŭ en la okcidenta mondo. Ofte oni ligas ilin al la okazonta "ekzamena" konferenco en Beograd, aŭ al la konferenco pri "malarmado". Precipe la usona prezidento Carter, (sed ankaŭ aliaj okcid. politikistoj kiel v.d.Stoel en Nederlando), sin konigas kiel defendantojn de tiuj "homaj rajtoj". Demando estis: ĉu la homaj rajtoj kaj pacpolitiko estas interligitaj? Kaj se jes, kion vi opinias pri la uzado de la termino?
k.dino Lépeix kontribuis perletere, rakontante siajn proprajn spertojn en FRG kaj en GDR, el kiuj ŝi konkludis ke la libereco en la okcidento certe ne estas pli granda ol tiu en la oriento. En la korespondado kun iu en GDR, ŝi spertis ke protestletero al Honecker pri iu religiulo en malliberejo, sufiĉis por malebligi normalan korespondadon. La korespondantino ne plu sendis siajn leterojn kaj laŭdire rifuzis ŝiajn. Sed. la korespondantino almenaŭ ricevis informon ke "ĉia diskutado estas ne-utila", kiam oni sendis francan gazeton al ŝi.
"Kontraŭe" en FRG, oni ne dungis ŝin ĉar "ŝi estas komencantino", laŭdire, post kiam ŝi hazarde diris ke ŝi iam studis en Rostock(GDR). En Francio oni provas silentigi ŝin per ĉantaĝo je ŝia pasinta restado en psikiatria malsanulejo.
k.do Puvrez el Kanado unue rakontis pri sia porpaca aktiveco en sia lando por zorgi ke Kanado sin liberigu iom pli de Usono. Li opiniis ke rilate la homajn rajtojn, oni akcentu ekz.e la rajton de armerifuzantoj.
k.do Zimmerman ŝatus scii kion la politikistoj komprenas sub "homaj rajtoj" kiam ili parolas pri tiuj. La ĉefa malamiko de la homaro estas laŭ li la maljusta ekonomia sistemo. Per citaĵoj de Kristo kaj Goethe li montris la rilatojn inter ekonomio kaj milito.
Nura ekonomiismo ne sufiĉas laŭ k.do de Wit por klarigi ĉiujn kaŭzojn de

(daŭrigo)
militoj, kvankam ekonomiaj kaŭzoj estas gravaj. Komparante la starpunktojn de la okcidenta kaj orienta mondoj pri la homaj rajtoj oni konstatas diferencojn en la akcentoj je kelkaj rajtoj. En la kapitalisma mondo oni akcentas la rajtojn de la individuo(por sin esprimi libere ekz.e), laŭ la klasika liberala tradicio, dum en la alia parto de la mondo oni akcentas la sociajn rajtojn (ekz.e la rajto je (inda) laboro), kio estas pli laŭ la marksisma tradicio. Verŝajne tiuj opinidiferencoj malhelpas iaman interkonsenton pri la demando ĉu oni bone konsideras la homajn rajtojn en iu lando.
Reage k.do Pelle Persson rimarkas ke por li tamen la rajto forlasi la hejmlandon estas tre grava.
k.do de Wit rimarkas ke tia rajto ne multe valoras se oni malsatmortas.Kvankam la homaj rajtoj estas bele priskribitaj en la UN-deklaracio, ili estas sufiĉe abstraktaj.Same, kiam oni parolas pri "libereco" aŭ "demokratio"; oni devas ĉiam konkrete demandi: "por kiu?", "por kion fari"? La rajton rifuzi la armeon devas havi ĉiu en ĉiuj landoj, estis la respondo al "persona" demando de k.do Pelle Persson.
Alia persono rimarkis ke pri la "homaj rajtoj" estas sufiĉe da konfuzo nuntempe.
k.do Puvrez: la demando pri milito aŭ paco estas pli grava ol havi "iun rajton" kaj esti mortigata en atommilito.
k.do Grollemund:la ekzemplo de la Sahara popolo montras ke kelkfoje la homoj estas tiel senrajtigitaj ke ne restas alia solvo ol komenci liberigan batalon.
k.do Lebec akcentis la rolon de la grandaj armilfabrikantoj en la militoj en Afriko, kie ili ofte rekte intervenas por sekurigi siajn profitojn.La decidoj de la konferenco en Helsinki povas nur malmulte efiki ilate tiun "negocon".
k.do Mathis memorigas pri la protestoj de sindikatoj en Francio, kiam oni volis fermi armilfabrikon.La ekonomio kaj la laboristoj multe dependas de la armilfabrikado.

Tiel aŭtomate oni revenis al la persona respondeco.k.dino Stella de Weerd ĉiam sin demandas kiamaniere ŝi kontribuas nevole al milito.Ekz.e pagante impostojn.

Kaj se oni rifuzas pagi iun imposton, oni tiamaniere endanĝerigas sian postenon(kiel prave rimarkigis k.dino Lépeix en sia letero).
Konklude k.do P. Persson esprimis sian opinion ke la tendenco al centralizado estas ankaŭ tre grava pacminacanta faktoro.Du etaj butonoj sufiĉas por eksplodigi la mondon.

La debato restas malfermita.Reagoj estas bonvenaj!

Persona konkludo de la prezidinto:
Estas klare ke la homaj rajtoj kaj pacpolitiko estas interligitaj sed oni tre kritikeme atentu la uzadon de la vortoj fare de la politikistoj por senmaskigi hipokritecon kaj militpreparadon.

protokolis kaj tajpis Bert de Wit.

Reage al la peto de la kunveno de la PF en Augsburgo, k.dino Lépeix skribis al mi ke ŝi estas preta daŭrigi la laboron, ĝis kiam oni trovos anstataŭanton, aŭ ĝis kiam oni ne plu volos ŝin. Provizore la sekretariejo restos do ĉe ŝi. Ĉar ŝiaj posteno kaj adreso estas momente ne certaj por la venontaj semajnoj, ŝi poste skribos al Sennaciulo, kie estos la nova adreso kaj kiamaniere oni povos pagi sian kotizon al la frakcio.

---

"Lübecker Parteiorgan", la 4-an de sept. 1914:
" Kiam la libereco de Eŭropo estos savita, ĝi ŝuldos tion al la forteco de la germanaj armiloj.Estas ja la plej granda malamiko de ĉiaj demokratio kaj libero, kontraŭ kiu sin direktas nia ĉefa batalo."

El: "La krizo de la socialdemokratio"(Juniusbroŝuro) de Roza Luksemburg.

La MEM-sekcio FRG(Schlossgasse 30 D-6731 Elmstein) disdonis flugfolion pri "Kio estas Berufsverbot"en la SAT-kongreso.Oni povas informiĝi pri la afero ĉe la supra adreso kaj eventuale helpi en tradukservo.

# POR SENNACIECA EKONOMIO

Okaze de la S.A.T. - Amikara kongreso dum lasta Pasko K-do Rapley prelegis pri Monda Socialismo. Li disdonis flugfolion el kiu mi tradukas nur tion: "Nenio estos vendenda en Socialismo; ĉiuj kaj ĉiu libere partoprenos en la produktado de la necesaĵoj; ĉiuj kaj ĉiu same libere ĉerpos kion ili bezonas aŭ deziras en la produktaĵoj." Tiu fluglolio estas eldonita de la Kanada Socialista Partio, kies organo "Monda Socialismo" aperas franclingve (anglalingve sub la titolo "Fulcrum");"UNU MONDO, UNU POPOLO" ŝildo apud la titolo estas invito al propono de E.-o, despli ke filioj de tiu "MONDA SOCIALISMO" ekzistas en Aŭstrio, Jamaiko, Britio-Irlando, Nov-Zelando, Svedio, Usono.

Ĉar mi promesis respondon al la demandoj starigitaj en la lasta "Juna penso" (117), mi poste revenos sur tiu "Monda Socialismo". La S.A.T.-Amikara kongreso koncernante nur franclingvanojn (kvankam alilingvanoj kutime partoprenas ĝin), K-do Rapley nur povis aludi pri fondo de frakcio en S.A.T., kiu laŭ mi estus ĝemela de la Abundana Frakcio, do povus anstataŭi ĝin.

A. NAUDE

Se vi deziras kompari tiujn diversajn sistemojn pri Disdona Ekonomio nepre legu la broŝurojn daŭre haveblaj laŭ la prezoj indikitaj en lasta L.J.P.

-:-:-:-:-:-

<u>Ĉu Abundismo povas stariĝi provizore en unu lando aŭ ĉu ĝi nepre devas fondiĝi je tutmonda skalo?</u>

La nordamerika asocio "Teknokratio" (Vd. la rubriko en L.J.P. 116) ne pretendas tujan monskalan reformon. Ĝi opinias jam solvendaj la tiuareajn problemojn, kaj esperas imitadon fare de aliaj landoj, laŭ la konstatitaj rezultatoj. Sajne tiu opinio valoras por iu ajn lando, kaj la efiko de ekzemplo estas agnoskita de ĉiuj, espere aŭ time; pro tio eŭropaj regnestroj kontraŭstaris la Francan Revolucion fine de la 18a j.c.; loka striko povas degeneri al multentreprena, tion scias kaj la kapitalistoj kaj la sindikatestroj. Do starigado de Disdona Ekonomio naciskale tre eblas laŭ mi. Mi eĉ konsideras la aferon pli baznaskanta: kelkaj najbaraj komunumoj mem organizas sian produktadon kaj sian konsumadon forigante profiton, daŭrigante provizore uzadon de la kutima mono por interŝanĝoj kun aliaj regionoj ĝis ties alpreno de socialisma ekonomio; tiele la produkt- kaj konsumplanado tutlandiĝos iom post iom, kaj laŭ la sama procezo de "oleomakulo" ĝi atingos kontinentan kaj poste mondan skalon.

Utopio ? : la malamikoj ne mankos, sed se la homoj, kiuj sopiras al feliĉo, ne efektive posedas nun la produkrimedojn (tamen heredaĵoj de siaj antaŭuloj), ili konsistigas nerezisteblan forton, kiu iam venkos.

<u>Ĉu por funkciigi Distribuan Ekonomion devas stariĝi ŝtato centrigita aŭ ĉu ĝi funkcius aŭtonome (nacie, regione; loke )?</u>

La respondo al la unua demando parte pritraktas tiun punkton. Kompreneble post la vastigo de la areo en Socialisma Ekonomio, tre certe montriĝos neceso modifi la lokajn produkplanojn ĉar la bezonkatalogo starigita laŭ la lastjara konsumado aperigos samtempe troaĵojn kaj mankojn (temas nur pri necesaĵoj). Tiuj ŝanĝoj estos volonte akceptitaj de la bazaj komunumoj, ĉar la superaj instancoj, kiuj ordigos la planadon fontos demokrate el la bazaj organizoj. De tia landa planado tranpasi al tutmonda estas nur plivastigo, facila inter socialistaj homgrupoj, kiuj ne celas profiton (nek individuan, nek ŝtatan); kontraŭos nur tiuj kiuj restos monavidaj ĝis ili estos kunportitaj de la socialisma fluo.

Ĉu kreiĝus burokrataro ?

La organizinstancoj (prefere al "superaj" instancoj, sed la vorto "supera" montras nur prizorgadon je pli granda skalo) ne povos fariĝi burokrataro se la homoj atentas al nedevojiĝo de la socialismo. En nia esperantista medio S.A.T.- anoj aŭ L.E.A.-anoj estas sinceraj demokratoj; ĉiuj agnoskas liberecon por la aliaj; la debatoj en niaj kunsidoj estas viglaj, tamen respektas la opiniodiversecon, sed pro neintereso, pro fuĝo antaŭ ia ajn respondeco aŭ laboro antaŭvidite ĝena, estas plej ofte la samaj homoj kiuj gvidas, agas sole kaj longtempe, ĉar neniu kandidatas al ilia asocia posteno.

Estus pli demokrate ke post unu-du jara periodo gvidantoj estus aliaj homoj, la anstataŭigitaj restante en la teamoj por daŭre alporti sian sperton; ĉar se ekzistas teamo (ne ununura respondeculo) la transpreno de funkcioj glatiĝas kaj plue certe ne okazu risko de malfruo en la laboro, eĉ de faka malapero. Pro nia relative malgranda nombro kaj la ordinara malriĉeco de niaj grupoj kaj asocioj ni ne timu al burokratiĝo kaj ties konsekvencoj... Do se la popoloj atentas pri la ofta ŝanĝo en la gvidpostenoj laŭ la ĉisupraj principoj burokrataro ne kreiĝos en Disdona Socialismo, despli ke la elektitaj gvidantoj ne ricevos pli altan Socian Renton ol ĉiuj aliaj homoj.

Ĉu armeo kaj policistaro malaperus ?

Logike en socio socialisme organizita armeo devus malaperi: neniu lando celus profiti la riĉaĵojn de la aliaj ĉar tutmonda sennacieca socialismo interŝanĝe dispartigos la tutterajn riĉaĵojn al ĉiuj. Starigita nur unulande Disdona Socialismo forigos ĉian armeon, same kiel postulas la absolutaj pacistoj, kiuj kalkulas pro la ekzemplo okaze de unuflanka senarmigado. Responde al eventuala agreso neperforta rezistado pli valoras ol defenda milito. (Vd. en la Broŝurservo de LJP: Ĉu armeo aŭ neperforta defendo? BR. n° 118 B )

La policistoj - malpli nombraj - plenumos unu inter la diversaj servoj, ĉefe zorgos pri la cirkulado. La taksado de la agoj kaj ties eventuala puno restos ĉe la baza grupo : en simpla lerneja kooperativo,(unuagrada lernigado), kiu vere funkcias sub gvidado de la lernantoj, kamaradaro mem voĉdone decidas pri la punoj kaj por la ordorganizado ĝenerale. Ĉu malliberejoj estos necesaj? : ĉiu senescepte ricevos vivrimedon larĝe sufiĉan, do kial rabi ? Por la aliaj gravdeliktuloj aŭ krimuloj malsanulejoj pli taŭgas.

Facile dirite opinios multaj. Sed la hodiaŭaj utopiistoj estas la morgaŭaj realistoj.

A. NAUDE

Post verkado de tiu rubriko mi ricevis aliajn demandojn, kies respondoj troviĝas en antaŭaj rubrikoj. Mi nur resumas la sekvantajn ideojn:

La enuigaj, lacigaj aŭ danĝeraj laboroj estos akceptitaj de "ĉiuj kiuj pro natura helpemo, aŭ por havigi sencon al sia vivo forlasas senhezite la "agrablaĵojn" kaj riske de sia vivo oficas ĉe iu katastrofloko aŭ pli simple inter la malsanuloj, la malsatantoj". (mia rubriko en L.J.P. 116).

Iuj bezonoj kaj servoj ĉiam estos plenumataj de la homoj mem, ne per maŝino: ekz. bubvartado fontas ĉefe de amsento, kiu nenia maŝino povos anstataŭigi.

En Socialisma ekonomio oni ne plu parolas pri kosto. Pro la malgrandiĝo de la homa laboro la individuoj pli bezonas servojn, estas vere. Abundo da servoj ekzistas kiel tiu de varoj. Kaj tiuj servoj estas akireblaj per la al ĉiuj disdonita Socia Rento, kies uzo estas libera por la servoj kiel por la varoj. Ĉiu nova plano orientas al kresko aŭ al malkresko la diversajn servojn laŭ la antaŭaj postuloj... kaj la nunaj eblecoj.

En la servoj viciĝas la transportoj, la disvastigo de la informoj, la kuracado kaj socia asekureco, la familia helpo, la distroj kaj kukturaj aferoj, k.t.p. En racie socialisme organizita socio tiuj servoj kreskas dank'al la progreso evidente, sed ankoraŭ dank'al malfavoreco al la neutilaj (por ne diri malutilaj) kiaj Nacia Loterio, ĉevalvetkurado, kaj memkompreneble la multege rabanta Armeo.

A.NAUDE

# V I V O   D E   L A   S.A.T. - J U N U L F A K O

1) JF-perantoj:

K-do TEZUKA Tosio akceptis la perantecon por Tokio, "kvankam nun ne troviĝas aktiveco de SAT-junuloj en Tokio". Li raportas pri la tiea situacio:

"Ni devas unue starigi la agadplanon de SAT mem en Japanio, k por tio certe junaj satanoj devos ĉefe klopodi.(...) Krome, en Japanio ankoraŭ ne estas firme organizita la neŭtrala esperanto-movado, do kapablaj junaj satanoj ofte laboras por la neŭtrala movado.

"En la kadro de la Japana Esperantista Kongreso, kiu okazos en Tokio de 26a ĝis 28a de aŭgusto, ni havos kunsidojn de SAT. Ĝis tiam mi sendos la enketojn al ĉiuj membroj de SAT en Japanio k kolektos la opiniojn k proponojn, do mi esperas ke en la kunsidoj niplanos pozitivajn agadojn de SAT-Japania.

"En la fino de l' lasta jaro mi k aliaj kunlaborantoj (2 satanoj) fondis la grupon nomatan "Esperantista Grupo por Homaj Rajtoj", kiu havas regulan kunsidon en ĉiu marda vespero, k traktas diversajn problemojn pri Homaj Rajtoj enlandajn (naciaj malplimultoj de Japanio; koreoj, ĉinoj, taivananoj, ainoj, ktp.) k eksterlandajn (subpremoj de homaj rajtoj en Taivano (Formoso), en Sudkoreio, en Ĉeĥoslovakio. La Grupo do deziras kontakti similajn grupojn aŭ individuojn, kiuj interesiĝas pri la problemoj."

Pri la Unua de Majo, "en kiu partopreni la E-Grupo por Homaj Rajtoj alvokis al aliaj esperantistoj", li skribas ke "fakte partoprenis 14, el kiuj kvar SAT-anoj. Ni disdonis ĉ. 3.500 flugfoliojn, kiuj atentigas pri utileco de Esperanto k graveco de homaj rajtoj, marŝis k kantis la Internacion." Li esperas, ke venontjare estos pli granda sukceso.

Li okupiĝis ankaŭ pri eldono de libro pri Esperanto. "Ĝi estas represo de malnova libro el 1932 kun komentoj. Ĝi estas nomata "Komencoj de Esperanto-Lernado en Japanio", leginda por SAT-anoj, kvankam verkita en la japana,ĉar per ĝi oni bone komprenas la celojn k la etoson de la antaŭmilita laborista esperanto-movado, nomata Proleta Esperanto-Movado."

K-do KOVÁCS Béla akceptis la perantecon por Hungario. Li ankaŭ fariĝis LJP-peranto. "(La 20an de aŭgusto) mi estis en nia Esperanto-klubo kaj prelegis pri miaj kongresaj travivaĵoj. Tiam mi menciis al miaj samklubanoj "LJP"-n. Eble mi povos varbi abonantojn." Jam du li varbis. Li atentigas, ke tamen "ni havas malfacilaĵojn, kiujn unue ni devas venki. Multaj homoj miskomprenas SAT-n. Unue mi devas konvinki ilin, ke SAT-movado estas bona, moderna movado, kio estas por pacemaj homoj kaj internaciismo. Ĉu ne?"

Perantecon akceptis ankaŭ k-do Jomo IPFELKOFER, por Germanio (precipe Bavario). La Junulfako havas do nun kvar perantojn (k-dino Tamen TERNANT jam de fino '76 peras por la Pariza regiono). Ilia tasko -- mallonge: informi pri la laboro de la JF-anoj en sia regiono kaj organizi la lokajn aktivecojn -- ne ĉiam estas facile plenumebla. Tamen, kiel eta estas tiu plenumo, ĝi estas absoluta neceso por la normala vivo kaj disvolviĝo de la Junulfako, kies forteco estas garantio por la estonto de nia Asocio. Kandidatoj estas bonvenaj! Ili kontaktu nin: Junulfaka Komitato de SAT, 37 rés. de la Madeleine, F 78460 Chevreuse.

2) SAT-subvencio: Kelkajn tagojn antaŭ la Kongreso, ni ricevis de la Plenum-Komitato 1740 FF. La Subvencio de SAT al sia Junulfako tiel sumiĝas je 2040 FF por 1977.

3) Reprezentanto de la SAT-JF ĉeestis la TEJO-Kongreso en Poitiers. Lian raporton ni baldaŭ aperigos en LJP. Ni provos interkonsenti kun TEJO-estraro pri interŝanĝo de reprezentantoj okaze de la venontaj kongresoj.

4) Post la Kongreso: Dum sia Kunsido, la JF esprimis sin pri la agado en la venonta jaro (vd. protokolon p. 4-5): ĝi estos daŭrigo kaj sekvo de la agado en la pasinta jaro, kun ekde decembro-januaro grava helpilo. Ĉiu JF-ano ricevos la organon de sia Fako, per kiu li/ŝi povos informiĝi pri ties funkciado, pri siaj taskoj, interŝanĝi spertojn, pridebati siajn ideojn, ktp...

Ni akceptis la inviton de k-do Grandière, ke la JF kunvenu dum la Pentekosta renkontiĝo en Nemurso. Jam nun notu la daton (D 1978 05 14) de la rendevuo!

JFK, septembro 1977.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

Directeur de la publication: Baudé. Imprimeur: J.-Pierre Lévy, 67 avenue Gambetta, 75020 Paris.-- Numéro C.P.P.A.P.: 39 863.